001 : = 089.2 = 061.3(100).053.6„1957.08"(449.1)

## REZOLUCIO

de la 2-a kongresa sekcio de 42-a Universala Kongreso
(organizita de UEA kaj ISAE)

La dua sekcio *„La internacia lingvo en scienco kaj tekniko"* de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto en sia kunveno de la 6-a de aŭgusto 1957, kiun ĉeestis 250 personoj el 21 landoj, decidis fari jenajn rekomendojn por la celo plivastigi la uzon de Esperanto en la scienco kaj la tekniko.

1. ISAE revivigu la tradukan servon.
2. La landaj sekcioj de ISAE aŭ unuopaj membroj de ISAE en landoj sen landa sekcio, faru bibliografion de sciencaj verkoj kaj studoj, aperintaj en Esperanto en la koncerna lando, laŭ la modelo de la japana bibliografio.
3. La sekcio atentigas pri la graveco de la fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj tre rekomendas al ĉiuj esperantistoj-fakuloj aliĝi al sia faka organizaĵo.
4. La fakaj Esperantaj organizaĵoj sekcioj de ISAE kaj instigu siajn membrojn aliĝi individue al ISAE.
5. La malfortaj fakaj organizaĵoj eldonu almenaŭ bultenon por kontaktigi sian membraron.
6. Ĉiu sciencisto aŭ fakulo, individua membro de UEA, fariĝu fakdelegito por sia fako.
7. La Esperantaj fakaj organizaĵoj aliĝu al la plej grava samfaka neesperantista organizaĵo kaj instigu siajn membrojn aliĝi individue al ĝi kaj partopreni la internaciajn fakajn kongresojn kie ili ekuzu Esperanton.

061.22(I.S.A.E.).053.7„1957.08.06"(449.1)

## PROTOKOLO

de la jarkunveno de ISAE dum la Kongreso en Marsejlo

La jarkunveno okazis en la salonon „Grabowski" la 6.8.1957, kaj komenciĝis je la 14h10. La kunvenon partoprenis 30 membroj el 12 landoj.

La jarkunvenon malfermis la vicprezidanto s-ro S t ø p-B o w i t z kun bondeziro pri fruktodona laboro. La taskon raporti por la Gazetara servo akceptis s-ro N. S m i t h (Anglujo) kaj la protokolon faros prof. B. P o p o v i ĉ (Jugoslavio). La ĝenerala sekretario, prof. P o p o v i ĉ proponis jenan tagordon:

1. Malfermo.
2. La Estrara raporto por 1956.
3. La ekonomia raporto por 1956.



4. Diskuto pri la raportoj.
5. Absolvo de la Estraro por 1956.
6. Propono pri la reorganizo de la Asocio.
7. Diskuto pri la oficiala organo de ISAE.
8. Jarkotizo por 1958.
9. Internacia Geofizika Jaro.
10. Centro por internaciaj kulturaj interŝanĝoj.
11. Fermo de la jarkunveno.

Oni akceptis la tagordon kun la rimarko ke oni pritraktu ankaŭ la revivigon de la Traduka servo, dum la diskuto pri la reorganizo.

II-V.

La ĝenerala sekretario tralegis la estraran kaj ekonomian raportojn por 1956. ISAE havis landajn sekciojn en Britujo, Germanujo, Japanujo, Jugoslavio kaj Nederlando, delegitojn kaj perantojn en aliaj 15 landoj kun entute 430 membroj. En orienteŭropaj landoj oni trovis delegitojn, sed oni ne povis kolekti membrojn pro neebleco sendi al ili kredite la revuon. La aperigo de *„Sciencaj Studoj"* estas certigita, sed bedaŭrinde *Scienca Revuo* denove aperadis neregule. La kapitalo de ISAE kreskis pro ŝparoj en la administraj elspezoj. La fondaĵo *„Scienco"* ricevis la unuajn donacojn en la sumo de ĉ. 2000 steloj.

La vicprezidanto faris aldonan raporton pri la baldaŭa translokado de la biblioteko. Al la demando pri profito de la revuo prof. P o p o v i ĉ klarigis ke ĝis nun ni pagis konstantan sumon (4 guld. por ĉiu aboninto) al la eldonisto, sed li eldonis ĝin proprariske, kun certaj perdoj. Post tio la raportoj estis akceptitaj kaj la Estraro absolvita.

VI-VII.

Prof. P o p o v i ĉ informis ke la kuracistoj akceptis aliĝi komplete al ISAE, tiel same eble faros la geografoj kaj la juristoj. Krome la situacio postulas laŭfakan aktivecon en siafaka medio. Sed por ke ni ne multe dissplitiĝu, li proponas unuiĝon en nur unu scienca asocio, sed kun kelkaj memstaraj branĉoj. Li donis ankaŭ proponon pri la konsisto de la Komitato kaj de la Estraro. La vicprezidanto S t ø p - B o w i t z substrekis la bezonon de la laŭfaka reorganizo kaj la sekretario de IGA (geografoj) s-ro v o n d e r L e y diris ke li proponos al la kunveno de IGA ke ankaŭ ili aliĝu al ISAE. Prof. S i r k interesiĝis kiel tiam estos kun la revuo. P o p o v i ĉ opinias ke ĉiu membro devas aboni almenaŭ unu el la revuoj, laŭ propra elekto, kaj - al la atentigo de prof. S i r k pri la danĝero por *Scienca Revuo* - li respondis ke novaj revuoj ne estus akceptotaj kiel organo de ISAE sen interkonsento de la Komitato. Prof. S i r k tamen opinias ke ĉiu membro devas aboni *Sciencan Revuon*.

La diskuton partoprenis ankoraŭ 6 membroj, inter kiuj s-ro R. W a-

t i e r pledis por fondo de *Elektroteknika sekcio* (kiun proponon skribe sendis ankaŭ s-ro A l e x a n d e r s s o n). La fina konkludo estas ke la Estraro preparu la proponon de la nova Statuto, en kiu estu antaŭvidota laŭfaka aktiveco de ISAE, sed ke la fakojn fiksu laŭ eblecoj la Komitato. La gazetan problemon la Estraro ankoraŭ pridiskutu, ankaŭ kun la reprezentantoj de la kuracistoj kaj de la geografoj.

Fine oni decidis ankaŭ restarigi iam ekzistintan *Tradukan servon,* kiu ebligos al scienculoj akiri en Esperanto, laŭ fiksota tarifo, tradukon de kiu ajn scienca artikolo aperigita en iu nacia lingvo.

VIII.

La eldonisto de *Scienca Revuo* postulas plialtigon de la abono por la membroj de ISAE al 6 ned. guld. La saman abonon oni povas ordigi por *Medicina Revuo.* Tial prof. P o p o v i ĉ proponis, kaj la jarkunveno akceptis, fiksi la puran kotizon por ISAE al 10 steloj kaj la abonkotizon por la revuo al 25 steloj (por studentoj 5+15 steloj), sed ke oni al la delegitoj donu la rabaton 20 % nur de la kotizoj, kaj de la abonoj 10 %.

IX-XI.

Pro manko de tempo la jarkunveno rajtigis la Estraron organizi iuspecan helpon al la Internacia Geofizika Jaro kaj laŭ la diskuto en la morgaŭa kunveno fari la decidon pri la Centro por Internacia Kultura Interŝanĝo.

La jarkunveno finiĝis je la 16-a horo.

Protokolis
B. P o p o v i ĉ

Prezidis
C. S t ø p-B o w i t z

*Rimarko:* Laŭ la Statuto de ISAE ĉiu membro rajtas postuli la referendumon dum tri monatoj post publikigo de la decidoj, se li ne konsentas kun iu el la decidoj de la jarkunveno.

061.22 I.S.A.E.

## INFORMOJ DE I.S.A.E.

**Donacoj por la fondaĵo „Scienco".** Dum la kongreso en Kopenhago donacis:

| | | |
|---|---|---|
| d-ro S. Ĝuĝev, Bulgario ............ | d.kr. 32.— | |
| Prof. B. Popoviĉ, Jugoslavio ...... | d.kr. 12.— | |
| Inĝ. A. Donneis, Usono ............ | d.kr. 10.— | |
| malgrandaj donacoj .................. | d.kr. 33.— | |
| sume | d.kr. 87.— = steloj | 174.— |

Aparte donacis:

| | | | |
|---|---|---|---|
| s-ro J. Derieuw, Belgio, | belg.fr. 214.— | = steloj | 63.— |
| Prof. B. Popoviĉ, Jugoslavio, | din. 20000,— | = steloj | 1000.— |
| | entute | steloj | 1237.— |



Al la donacintoj koran dankon! La donacojn sendu al s-ro S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 n.b. JOHANNESHOV, Svedujo, poŝtĝiro 190976 (senpere aŭ pere de la landaj delegitoj).

**Mankas delegitoj** en multaj landoj (aŭ la nunaj delegitoj pro diversaj kaŭzoj deziras eksiĝi). Ni petas la aktivajn membrojn de ISAE kiuj povas transpreni la delegitan taskon skribi al la ĝen. sekr. prof. B. Popoviĉ (Zagrebaĉka 18, SARAJEVO, Jugoslavio). Oni bezonas la delegitojn *precipe por Usono, Francujo, Svisujo, Ĉinujo kaj Izraelo.*

**Internacia Geofizika Jaro.** En julio komenciĝis la Internacia Geofizika Jaro, granda scienca evento, kiun ISAE ne devas preterlasi, sed per siaj rimedoj helpi ĝian efektivigon. D-ro *R. Lewin* sugestas la tradukadon de la sciencaj dokumentoj, koncernantaj la agadon de IGJ. La membroj de ISAE, el la fakoj ligitaj kun IGJ, kiuj pretas helpi en la tradukado, aŭ kiuj havas alian realan ideon pri kunlaboro kun la IGJ, estas petataj skribi al la ĝen. sekretario de ISAE, pli bone rekte al d-ro *Ralph A. L e w i n,* Marine Biological Laboratory, Woods Hole (Mass.), Usono.

**Internacia Lingvo en Scienco kaj Tekniko** estas la temo pritraktota en la dua kongresa sekcio de la 42-a Universala Kongreso en Marsejlo, kunlabore kun ISAE. La ĝen. sekretario de ISAE havas la taskon prepari la enkondukan raporton pri la ĝisnuna utiligo de esperanto en scienca kaj teknika kampo kaj pri la ebloj por la estonta aktiveco en tiu direkto. Ĉiu helpo en la preparoj kaj en la diskutoj estas bonvena kaj danke akceptota. Pripensu speciale pri ebloj de unuiĝo de ĉiuj sciencaj E-organizaĵoj (medicinistoj, geografoj) kun ISAE, kondiĉe ke ili funkciu kiel memstaraj sekcioj de ISAE, sed ke ni kune agu por komunaj sciencaj celoj.

La ĝen. sekr. B. Popoviĉ.

## KOTIZOJ DE ISAE 1958

| | |
|---|---|
| La kotizo de aktiva membro | 10 steloj |
| La abonkotizo de aktiva membro | 25 steloj |
| Abono de nemembro | 30 steloj |
| Aprobantoj pagas minimuman kotizon | 10 steloj |

La membro pagas sian kotizon al la delegito de ISAE aŭ al la peranto. Delegito rajtas depreni 20 % de la kotizo kaj 10 % de la abonoj kaj la reston sendi al la eldonisto (sendante la informon kun la raporto al la sekretario-kasisto de ISAE). La kotizoj en diversaj landoj estas: